



**MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"**

**INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: RAMÓN DE SALAS**

**Administracio kaj Redakejo: Str. RODA, n.º 14-16**

**MALNOVAJ PAĜOJ**

**AL MORTO**

Ho, venu mort'! Sen plendo, sen doloro  
En viajn brakojn mi enjetos min...  
La revoj trompis min, laciĝis koro  
Kaj paco nur en tomb' atendas min,  
Foriĝis miaj belaj idealoj,  
Forflugis la esperoj sen reven',  
Mi estas nun tro-sata je bataloj;  
Ho, venu mort', mi prenos vin kun ben'!

El «Lingvo Internacia», n-ro 1º, januaro 1897.

«KANTO DE L' VENTOJ»

(EL LA SVEDA POETO P. D. A. ATTERBOM)

For super mar', moviganta la ondon,  
Super la ter' en bruanta vojaĝ'!  
Nin jam ekvokas eksteren en mondon  
Reĝo matena kun roza vizaĝ'.

For al bluanta,  
Onda la mar'!  
For al bruanta,  
Verda l'arbar'!

Homoj kaj bestoj en tera la ĉelo  
Aŭdas kun tim' je ventega la kri'.  
Ni en liber' ĝis l'arkaj' de l'ĉielo  
Flugas kaj venas sciige de ĝi.

Sig. Ag.

(La poemo estas muzikigita de N. Moller).

El «Lingvo Internacia», n-roj 20º-21º, de 8-9 de 1897.

**BLANKA PEJZAĜO**

*Al mia amikino Hilma,  
kiel sincera memoro.*

Neĝas...  
Neĝas milde, sed obstine. Malaperis la tero antaŭ miaj okuloj.  
Nur grandegan ebenaĵon blankan mi vidas.

Miaj neĝpiedvestoj lasas profundajn postsig-  
nojn sur la neĝon kaj la ritma krakado de miaj  
paŝoj laŭtakte atingas miajn orelojn, kiel unutona  
tik-tako de horloĝo.

Dum kelkaj momentoj la neĝo ne vipas mian  
vizaĝon.

Mi rigardas ĉirkaŭen...; min ĉirkaŭas la plej  
kompleta soleco...

Tie, malproksime, kvar montpintoj desegniĝas  
sur la griza ĉielo. Plena je sovaĝa beleco la pejza-  
ĝo sin prezentas al mi.

Malsupre de la malproksimaj montpintoj, mi  
povas klare vidi kelkajn arbojn similajn al fabelaj,  
arbaraj malgranduloj kapkovritaj de blanka ka-  
puĉo, sagacaj gardantoj de belan, misteran kaste-  
lon kaŝatan en la montoj kaj loĝatan de fantazia,  
blonda princino kun melankoliaj okuloj bluaĵ,  
perlamotkolora vizaĝo kaj lipoj ruĝaj, allogaj...  
kiel tiuj princinoj, kiuj aperas ĉe la feinaj rakon-  
tetoj legitaj de ni en nia infanaĝo.

La arboj estas milde skuataj de la vento, kiu  
dismovas senfoliigitajn branĉojn kaj al ili mal-  
grandajn neĝpecojn forrabas.

Momente mi imagas, ke mi estas Jean Thoreau  
vojirante mejlojn post mejloj, havante ĉiam en la  
menso la ĉarman kaj delikatan figureton de Me-  
lissa.

Ĉio estas regata de melankolia silento, kiu, se  
brilus la suno; se la floroj dissendus sian vivigan  
parfumon ĉien kaj la arboj troviĝus plenaj je ver-  
deco, estus rompata, kiam la birdoj dediĉus la  
plej dolĉajn kantadojn al Naturo.

Num, ĉio kovrita de neĝo! Pejzaĝo, en kiu nur  
aperas ĉielo, montoj kaj malproksimaj arboj, ĉio  
blankkolora, estas iom malgaja.

Sed ĉu ne estas ankaŭ bela tiu malgajeco?

Ree ekneĝas. Kaj dum la vento rapide kirlas la  
falantajn neĝflokojn, miaj lipoj ripetas la versojn  
de Espronceda en sia "Malespero":

"Plaĉas min la kamparo  
De neĝ' tute kovrita..."

J. GASCON CARRETER.

## MALZORGO KAJ AMO

(Daŭrigo)

Sia patrino rigardis la malrespektaman filinon fikse dum kelkaj momentoj. La piloto partoprenis:

"Mi multe ĝojos montrante ĝin al vi, sinjorino", li diris ĝentile.

La patrino hezitis; fine ŝi leviĝis kaj akceptante la helpon de la piloto transpasis la vaporŝipan randon kaj subportate de liaj brakoj saltis sur ĝian ferdekon kaj sekvis lin malsupren.

"Tre bela", ŝi diris balancante aprobe sian kapon, dum la piloto honoris ŝin. "Tre bela".

"Ĝi estas oportuna kaj granda relative al tiu ĉi ŝipeto", diris la piloto, dum li prenis argilan botelon el breto kaj plenigis paron da glasoj. "Provu ĉi tiun bieron, sinjorino".

"Mi ne scias, kion vi opinias pri junulino, kiel tiu mia", murmuris la sinjorino trinkante iomete.

"La junularo", diris la piloto, kiu ankoraŭ ne estis dudekkvinjara, "estas ofte tiel".

"Tio malutilas ŝin", diris ŝia patrino. "Ŝi estas tamen bela junulino en sia stilo".

"Mi ne vidas, kiel ŝi povas rimedi tion, se ŝi estas tiel", diris la piloto.

"Ho, tute ne", diris la sinjorino bonhumore. "Ŝi dikiĝos, kiel mi, kiam ŝi maljuniĝos".

"Ŝi ne povos fari ion pli bonan", diris la piloto ameme.

"Malsaĝaĵo", diris la sinjorino ridetante.

"Vi ambaŭ estas tiel similaj, kiel du pizoj", insistis la piloto. "Mi ne dubis pri tio, ke vi estis fratinoj, kiam mi vidis vin unue".

"Vi ne estas la nura persono, kiu supozis tion, diris ŝi ridante mallaŭte; "estis ja multaj aliaj".

"Mian plaĉas vidi sinjorinojn ĉirkaŭe", diris la piloto, kiu deziregis, ke ŝi siavice invitu lin. "Mi volus, ke vi ĉiam restus tie ĉi. Vi gajigas la kajuton".

"Kiel flatema vi estas", diris lia vizitantino, dum li replenigis ŝian glason, kaj, ĉar ŝi montris nenium deziron foriri, la piloto pretekstante bezonon paroli kun la maŝinisto rapidis sur la ferdekon por bruletigi siajnflugilojn pluan fojon, kiel papilio ĉe flamo.

"Ĉu ankoraŭ leganta?", li diris scivole, kiam venis antaŭ la junulinon. "Ĉio pri amo, mi supozas".

"Ĉu vi lasis mian patrinon tute sola tie malsupre?" demandis akre la junulino.

"Nur unu minuton", diris la piloto iom malkuraĝigite. "Mi ĵus alvenis supren por serĉi la maŝiniston".

"Nu, li ne estas tie ĉi", estis la senesperiga respondo.

La piloto atendis unu aŭ du minutojn, dum la junulino legadis kviete, kaj tiam li reiris en la kajuton. La sono de milda, laŭtakta spirado atingis liajn orelojn kaj paŝante senbrue li vidis ĝoje, ke lia vizitantino dormis.

"Ŝi dormiĝis", diris li, reveninte, "kaj ŝi ŝajnis esti tiel agrable, ke mi ne volis vekti ŝin".

"Nek mi konsilus tion al vi", diris la junulino; "ŝi ĉiam vekiga malbonhumore".

"Estas strange, kiel ni renkontis nin reciproke", diris la piloto sentimentale; "tio ŝajnas providenca, ĉu ne?"

"Ŝajnas malzorgo", diris la junulino.

"Estas same", respondis la piloto. "Mi ĝojas, ĉar mi lasis al la ŝnuro pendi de la ŝipostajo. La plej bona laboro el ĉiuj, kiujn mi faris iam ajn. Mi ne estus vidinta vin, se ne estus okazinta tio".

"Kaj mi supozas, ke vi ne plu vidos min", diris la junulino kontente, "tiamaniere mi ne scias, kion bonan vi atingis per tio".

"Mi rapidos al Limehouse ĉiam, kiam mi venos en la havenon", diris la piloto; "Estos malprobable, ke mi ne vidos vin iun fojon. Eble dumnokte", li aldonis malgaje.

"Kaj mi devos atendi vin dum la tuta nokto sidante sur la ferdeko", diris fraŭlino Jansell moke.

Tiamaniere la konversacio gaje daŭris kaj la junulino, kiu tute ne estis indifera al lia vigla kaj gaja vizaĝo kaj belforta figuro, dividis sian tempon laŭ rilato de tri partoj por sia libro kaj unu por li.

La tempo estis forpasinta tro rapide laŭ tio, kio ŝajnis al la piloto, kiam ilia konversacio estis interrompata de serio de raŭkaj kaj nekompreneblaj kvazaŭ porkoblekoj devenantaj de la velŝipa kajuto.

"Tio estas mia patro", diris fraŭlino Jansell, levigante kun rapido, kiu montris klare la bonan disciplinon regantan ĉe Aquila; "li volas, ke mi riparu lian veŝton".

Ŝi lasis sian libron kaj foriris, dum la piloto sekvis ŝin per sia rigardo ĝis, kiam ŝi malaperis malsupren; tiam li sidiĝis kaj atendis.

Iom post iom la ŝipanaro revenis ĉe la vaporŝipon; sed sur la velŝipa ferdeko estis neniu vivmontro. Fine la ŝipestro venis kaj post inspekta rigardo al la helico ordonis ekveturi.

"Se ŝi almenaŭ venus supren", diris al si mem la malfeliĉa piloto, "mi riskus demandi al ŝi, ĉu mi rajtos ŝin skribi".

Tamen ne venis la okazo por endanĝerigi sian esperplenan karieron; la vaporŝipo malrapide disigis de Aquila kaj vojserĉinte inter vicoj de ŝarĝobarkoj atingis malrapide liberan akvon.

"Tute rapide antaŭen!" kriis la ŝipestro per la ordontubo.

La maŝinisto obeis, kaj la piloto rigardis melankolie, kiel rapide pliiĝis la akvokvanto inter ambaŭ ŝipoj. Subite lia mieno gajigis, kiam li vidis, ke la junulino kurinte sur la ferdekon ŝvingis sian manon. Preskaŭ ne kredinte siajn okulojn li responde ŝvingis tiun sian. La junulino gestegis rapide, ĉu montrante la vaporŝipon, ĉu la velŝipon.

"Nu, tiu junulino enamiĝis je vi", diris la ŝipestro. "Ŝi volas, ke vi reiru tien".

La piloto elspiregis. "Tio ŝajnas tiel", li diris modeste.

Kun granda ekmiro ili vidis tuj, ke la tuta ŝipanaro kuniĝis al la junulino kaj ankaŭ adiaŭis korege ilin ŝvingante strange siajn brakojn.

"Nu, kia strangajo! ĉiuj enamiĝis je vi laŭŝajne", diris la konfuzita ŝipestro; "la maljunulo nun prenas la trumpeton por paroli. Kion li diras?"

"Ion pri vivo (1) laŭ mia kompreno", diris la piloto.

"Ili pli multe ŝajnas marionetoj, al io alia", diris la ŝipestro. "Rigardu, rigardu nun ilin".

La piloto rigardis kaj, ĉar la distanco pligrandi-

(1) Angle vivo=life sonas iom simile al edzino=wife.

ĝis, li kuris al la ŝiprando kaj kun neklara vido pro emocio eksendadis korajn adiaŭojn. Se ne ĉestus la ŝipestro, severa moralisto, li estus sendinta kison al ŝi per sia mano.

(*Daŭrigota*).

## KASTELO "TRIFELS"

### La Legendo pri «Rikardo Löwenherz» kaj lia fidela «Blondel»

Proksime de l'urbeto Annweiler en la Rejn-Pfalzo oni vidas sur kruta roko la ruinojn de malnova kastele, nomata "Triroko" laŭ sia tripinta supro. Sur unu el la pintoj de l'roko ankoraŭ staras la turo, en kiu iam Rikardo Löwenherz, unu el la plej bravaj hercoj, sidis en mallibereco.

En la jaro 1189 imperiestro Frederiko Barbarossa entreprenis la trian krucan militon akompanata de la reĝoj Filipo Aŭgusto de Francujo kaj Rikardo I-a de Anglujo, nomita "Löwenherz" (leonkoro). Jam sur la vojo tra Malgranda Azio la imperiestron trafis lia sorto, li tranaĝis la rivecon Salefo sur sia ĉevalo kaj dronis en la torenta akvo antaŭ la okuloj de sia armeo atendanta sur la alia bordo. Per tio la entrepreno perdis sian estron kaj disputoj komenciĝis inter la gvidantoj kaj malpacigis unu al la alia.

Ĉiu volis ordoni, neniŭ obei. Rikardo plejgrave ofendis dukon Leopoldon de Aŭstrujo, kiu gvidis la germanojn; poste duko Leopoldo kaj la reĝo de Francujo reiris en sian hejmlandon kaj Rikardo restis sola en la laŭdata lando. Efektive li sukcesis fari kontraktojn kun la sultano Saladino, profite de la kristanoj kaj kontenta pri sia sukceso fine ankaŭ Rikardo iris sur la ŝipon por reiri en sian hejmlandon. Sed jam en la Mediteranea Maro fortega uragano puŝis lian ŝipon kontraŭ la marbordon de "Dalmacio" kaj faris ĝin neuzebla por la pluveturo. Tial la imperiestro estis devigata alvestite pluiri tra la teritorio de sia malamikego Leopoldo de Aŭstrujo. Proksime de Vieno li tamen estis ekkonata. Imperiestro Henriko, filo de Barbarossa, kiu ankaŭ estis malamika al la anglo, kaptita venigis lin al si, kaj oni transportis lin al la kastelo Trifels, kie oni pri la persono de la altranga malliberulo konservis perfektan sekreton.

Ĉi tie daŭrigas la legendo, laŭ kiu Rikardo Löwenherz estis liberigita de sia fidela poeto kaj servisto, de la kantisto "Blondel".

En Anglujo oni sciigis pri la forvojaĝo de Rikardo el Jerusalemo, kaj ĉar li post longeta tempo ne revenis hejmen, oni timis, ke li survoje estis surprize atakata kaj kaptite metata en malliberejon. Oni dissendis senditojn al ĉiuj direktoj, sed neniŭ el ili sukcesis ekscii la restadejon de la reĝo. Kiam aŭdiĝis konjektoj, ke Rikardo ie en la germanaj landoj estis tenata en kaptiteco, la intima amiko de la reĝo, la amkantisto Blondel, decidis, ne ripozi plu, ĝis kiam li trovos kaj liberigos lin.

Akompanate de du kavaliroj kaj kvindek viroj, Blondel ekvojaĝis al Germanujo kaj travagis ĝin al ĉiuj direktoj, sed sen iu sukceso. Blondel kaj lia brava aro jam decidis turni sin al Francujo, kiam ili iun tagon venis al la kastelo Triroko. Kiel kutime liaj akompanantoj bivakis en kaŝejo, dum Blondel unue sola foriris, kiel esplorante. Veninte proksime al la kastelo, li eksciis de kamparanoj,

ke altrangaj viroj sidas kaptite en la kastelo, sed neniŭ scias iliajn nomojn. Dum li ankoraŭ ripozis sur ŝtono, li aŭdis paŝtistinon kantanta vortojn konatajn de li:

La sago de mia pafarko,  
Ĝi alportas la mortodoloron.  
La sago el miaj okuloj  
Alportas amon en vian koron.

Profunde kortuŝite Blondel aŭskultis, ĉar ja li mem verkis ĉi tiun kantaton por sia reĝo, kaj kiam la paŝtistino demandite, de kiu ŝi konas ĉi tiun kantaton, respondis al li, ke ŝi aŭdis kantata ĝin de bela virvoĉo el la mallibereja turo, tiam Blondel certe sciis, ke Rikardo estas ĉi tie. Dum la nokto li ŝteliris sur la rokon, kie la profunda kastel-fosaĵo tuŝis turon similan al malliberejo kaj komencis sian kanton, kiun li ofte kantis kun la reĝo:

La sago de mia pafarko...

Apenaŭ li estis fininta, kiam—ho ĝojo—el la turo sonis al li, kiel respondo, la dua strofo.

Ĉe ĝiaj lastaj vortoj Rikardo estis paŝinta al la fenestro kaj tiam Blondel laŭte kriis: "Rikardo, mia reĝo, estas mi, via kantisto, kiu venis por liberigi vin!" Oni interkonsentis la forkuron en la venonta nokto kaj Blondel rerapidis al siaj akompanantoj per prepari kun ili ĉion. Ili faligis kelkajn arbotrunkojn, kiujn ili uzis por meti fortikan ponton trans la fosaĵon. Sed la kastelpordego estis—kiel ĉe ĉiuj kasteloj—bone fortigita. Jen la sieĝantoj ekvidis tuj apud la ĉefpordego elirpordegon, kiu estis pli facile venkebla. Kaj tiamaniere oni komencis la ekatakon al la kastelo Triroko. Malgraŭ la gardistaro, kiu de la bruego ja estis avizata, sed, ĉar ĝi ne estis preparita por tia surpriz-atako, ne povis rezisti efike. Blondel kaj liaj bravuloj baldaŭ sukcesis venki la kontraŭstaron de la kastelgardistoj.

Tiamaniere Blondel liberigis sian reĝon kaj lian akompananton, kaj la sukceso de lia kuraĝa faro estis la plej bela rekompenco por li. Senhalte ili atingis la maron kaj la hejmlandon. Ĉi tie la frato de Rikardo, Johano, intertempe okupis la tronon. Sed per tro rigoraj aranĝoj kaj maljustaj leĝoj li perdis la favoron de la popolo. Tial la ĝojego de la subuloj estis nepriskribebla, kiam Rikardo Löwenherz revenis hejmen kaj ree ekposedis sian tronon.

Tradukis el la germana

E. SCHÜTT.

Berlin - Friedenau.

## NOVAJ KURSOJ

La duan de la nuna monato komenciĝos novaj kursoj en nia societo Frateco laŭ la jenaj gvidadoj:

Kurso por komencantoj—Sro. Artigas.

Kurso por komencantinoj—Sro. Vallojera.

Kurso por mezgradaj gelernantoj—Sro. Gascón.

Supera kurso por gelernantoj—Sro. Salas.

Kurso per korespondado—Sro. Orós.

Ĉiuj ĉi kursoj, kiel kutime, estos ĉiudutagaj kaj petoj por partopreno oni faru en la sekretariejo de Frateco de 7-9 vespere.

## NACIA PERDO

La glora Dro. Santiago Ramón y Cajal, en la tuta mondo famkonata, Nobel-premiita sciencisto aragona mortis la pasintan monaton oktobro. Hispanlando perdis tiel maloftan eminentulon neniel anstataŭeblan, kies morto tute plenigas la hispanajn korojn je malĝojo.

NIA VIVO je la nomo de Frateco esprimas ĝian egan funebbron pro la nacia perdo kaj ĝian sinceran kondolencon al la frato de la mortinto, la eminenta, ĉitiea kuracisto, antikva ano de nia Societo, Dro. Petro Ramón y Cajal.

## ANEKDOTOJ

Rivarol' kutimis diri pri kavaliro P\*, kiu distingis per malpuremo: "Li makulas la koton".

\* \* \*

"Kiom malmulte vi min amas! riproĉis bela edzino al sia kunulo, vi estas kun mi kaj oscedas senĉese.—Pardonu, mia kara, afable respondis la edzo, edzo kaj edzino estas nur unu estajo, kaj kiam mi estas sola, enueco min kaptas".

\* \* \*

Oni demandis maljunulon, kial li estis needziĝinta? Li respondis, ke li ne havas korinklinon al maljunulinoj. Oni rediris, ke ĉar li estas riĉa, li povas facile trovi junan edzinon, kaj li reparolis: "Mi ne sentas amemon al maljunulinoj: mi estas ja maljuna, kiel vi volas, ke junulino povu havi inklinon al mi kaj min ami?"

(Galland).

\* \* \*

Du studentoj tre sin estimantaj reciproke, devigitaj disiri kaj ne kunvivi dum kelka tempo, faris unu al da alia promeson interkorespondadi dum foresto por ĉiam havi reciprokajn sciigojn.

Malgraŭ tiu ĉi propono tempo forpasis kaj unu el la studentoj tute mirante, ke li havas nenian novaĵon pri sia kolego, vere senpacienca adresis al li blankan paperfolion, sur kiun li nur estis skribinta: "?"

Ricevinte tiun strangan sendaĵon, la alia studento bone komprenis, ke tiu demandosigno signifas: "kio estas al vi, ke vi ne skribis?", kaj rapidis resendi al sia kamarado paperfolion tute blankan kaj senskriban, per kiu li volis respondi: "nenio".

\* \* \*

Generalo Grant', ĵus nomita prezidanto de la Unuigitaj Amerikaj Ŝtatoj, restis ĉe urbestro Burnside dum multenombra popolamaso ĉirkaŭis la domon kaj krie lin festaklamadis. La prezidanto aperis en balkono kaj danke salutis la publikon. Ĉiuflanke aŭdiĝis: "Generalo, alparolon, almenaŭ du vortojn". Grant antaŭen klinetis la kapon kaj per afabla, klara voĉo diris: "Ne, sinjoroj". Ĉiuj aplaudadis kaj la multamaso, kontentigita, ĉar ĝi aŭdis la du petitajn vortojn, trankvile disiris, kun elmonro de trea ravo.

\* \* \*

Sekve de tre animita interparolo kun Napoleono I, fraŭlino G. W., glora aktorino, petis lin pri

lia portreto. "Jen ĝi estas" ekkriis la imperiestro—eltirante ormoneron el sia poŝo.

\* \* \*

Kiam Sokrato sin preparis eltrinki la cikutvenon, Apolodoro prezentis al li multekostan mantelon, en la celo, ke li surmetu ĝin antaŭ ol morti. Sokrato rifuzis dirante: "Nu! mia mantelo taŭgis al mi por vivi, kial ĝi ne taŭgos nun por morti?"

\* \* \*

Kuracisto Chirac aŭdante paroli pri la reviviĝo de Lazaro diris: "Se li estus mortinta laŭ mia arto..."

\* \* \*

Oni iam demandis Fontenelle'on, kiamaniere li agis por havi tiel multajn amikojn kaj nenian malamikon. "Mi uzis ĉiam por tio du aksiomojn: ĉio estas ebla kaj ĉiu estas prava", respondis la sprita verkisto.

El la franca tradukis,  
VICENTE INGLADA.

## AVIZO

Oni sciigas al ĉiuj samideanoj intencantaj partopreni la Literaturan Konkurson anoncitan en la septembra numero de NIA VIVO, ke la tempolimo por ricevi la konkurantajn verkojn aŭ tradukaĵojn estas plilongigita ĝis la 31-a de decembro de la nuna jaro.

Ne forgesu, ke la premioj konsistas el la tri jenaj ĉefverkoj: En Okcidento Nenio Nova; La Faraono (tri volumoj) kaj Vivo de Zamenhof; do, kuraĝe iru por ilia konkero, hispanaj samlingvanoj.

## SPRITAĴOJ

Kelkaj amikoj en kunveno diskutadis, pri kiu el ili diros la mensogon plej grandan.

—Mi estas—diras la unua—la idioto plej granda el ĉiuj.

—Ne amiko—diras alia—, ni venis ĉi tien por diri mensogojn, kaj vi komencas dirante veron.

\* \* \*

En la kaĝon de tigro, eniris rato kun sia fileto, kaj ĉirkaŭrigardinte la lokon, diras al ĝi:—Antaŭen sen timo, mia fileto; tio, ne estas kato; ĝi nur estas tigro.

Tradukis, L. TIL.

## PENSOJ

Egoisto estas kapabla bruligi la domon de sia najbaro por friti ovon.

(Bacon).

\* \* \*

Libroj regadas mondon.

(Barbeirach).

\* \* \*

Prospereco de popoloj nur povas naskiĝi el ilia propra lando.

(Barante).

\* \* \*

La vero eniras en reĝajn palacojn, kiam oni disbatas iliajn pordojn.

(Barrere).